**Esperanto Societo Frankfurto**

Esperanto-Gesellschaft Frankfurt am Main e.V.
gegründet 1904 – fondita 1904

**aŭgusto 2014**

# ESPERANTO – INFORMILO


Esperanto-Gesellschaft Frankfurt am Main

www.esperanto-frankfurt.de

1. Vorsitzende
Katarina Eckstädt
Geschw.-Scholl-Str. 1
63486 Bruchköbel
Tel. 06181 76343


**Bankverbindung:**

Esperanto-Gesellschaft Frankfurt
**IBAN: DE75 5008 0000 0771 5717 01**
**BIC: DRESDEFFXXX**

Commerzbank Frankfurt/Main

**Beitrag:**

Mit DEB-Beitrag 80 €
Familienmitglied 40 €

Nur ESF 20 €
Familienmitglied 10 €




## Marjorie Boulton



foto: vikipedio

**… mi sufiĉe amas mian lingvon same kiel mian landon, por ne deziri trudi ĝin al ne-dezirantoj.“**

Marjorie Boulton
granda Esperanto-poetino
iĝis en majo 90-jara.

| einladung zum klubabend | invito al la klubvespero |
|---|---|

Bürgertreff Bockenheim
Schwälmer Str 28
Frankfurt am Main

| donnerstag, d. 7.8.2014 | ĵaŭdon, la 7an de aŭg. 2014 |
|---|---|

Liebe Mitglieder, Freunde und Interessenten,
wir laden Sie zum nächsten Klubabend ein, der am Donnerstag, den **7. 8. 2014** stattfinden wird.

Karaj membroj, geamikoj kaj interesiĝantoj,
ni invitas vin al la venonta klubvespero, kiu okazos ĵaŭdon, la **7an de aŭgusto 2014.**

**18.30 h**

**SPRACHRUNDE** **LINGVA RONDO**

**Traktado de la libro „Esperanto direkt“ de S. Marček**

**Walter Ullmann**

**19.30 h**

## Germana Esperanto-Kongreso 2014 en Erfurt



Dum Pentekosto okazis en Erfurt la Germana Esperanto-Kongreso. El nia asocio partoprenis ĝin Margarete kaj Walter Ullmann kaj d-ro W. Schwanzer.
La geedzoj Ullmann raportos al ni pri la laboro de la kongreso kaj personaj impresoj kaj travivaĵoj.

**Margarete kaj Walter Ullmann**

| donnerstag, den 21.8.2014 | ĵaŭdon, la 21an de aŭg. 2014 |
|---|---|

**entfällt / ne okazos**

**wegen der Ferien bei Saalbau** **pro la ferioj ĉe Saalbau**

## geburtstage im august — naskiĝtagoj en aŭgusto

Dr. Klaus Rumrich, 01.08.
Angelika Pfafferodt, 09.08.
Ewald Glauer, 14.08.
Dr. Anina Stecay, 29.08.

**Ni gratulas!**

## ausflug — ekskurso

# Ausflug zum Mittelpunkt der EU
# Ekskurso al la meza punkto de la EU




**Samstag, d. 23.08.14**

Liebe Mitglieder!
Wegen Bauarbeiten auf der Mathildenhöhe in Darmstadt wollen wir unserer Ausflug zu dem neuen Mittelpunkt der EU machen. „Neu“ deshalb, weil er sich wegen des Anschlusses von Kroatien an die EU verschoben hat. Er befindet sich nun in Westerngrund/Spessart/Bayern.
Treffpunkt ist am Bahnhof in Schöllkrippen (Endpunkt der Kahlgrund-Bahn) um 12 h; Ankunft des Zuges aus Hanau um 11.52 h Hanau Hbf ab um 11.02 h, Gleis 106).
Wir gehen dann zusammen zum Mittagessen in das Café Denk, Laudenbacher Str. 2 (gegenüber Bahnhof) in Schöllkrippen. Danach fahren wir mit PKW (die Bahnfahrer werden eingeladen) zum Dörfchen Westerngrund (ca. 7km). Nach dem Besuch des Mittelpunktes – wahrscheinlich mit Fotoaufnahmen – fahren wir weiter nach Gelnhausen und besichtigen dort die Kaiserpfalz Barbarossas. Danach wird sicher noch Gelegenheit zum Kaffeetrinken in einem dortigen Café sein.
Bitte bis zum 17.08. Bescheid geben (Ullmann, 06031 4617), wer dabei sein wird, da wir ja in dem Café Denk vorher eine ungefähre Zahl der Teilnehmer/innen angeben müssen.
Achtung: Da Bayern – bitte Reisepass mitnehmen!

**Je sabato la 28-an de aŭgusto 14**

Karaj membroj!
Pro konstrulaboroj sur la Mathildenhöhe en Darmstadt ni intencas ekskursi al la nova mezpunkto de la EU. „Nova“ pro tio, ĉar ĝi troviĝas pro la aniĝo de Kroatio nun en Westerngrund/Spesarto/Bavario.
Renkontiĝejo estas la stacidomo de Schöllkrippen (la fina punkto de la Kahlgrund-fervojo) je la 12a h; alveno de la trajno el Hanau je 11.52 h, ekde Hanau Hbf je 11.02 h, kajo 106).
Ni iros kune al tagmanĝo en la kafejon Denk en Schöllkrippen. Poste ni veturos per aŭtomobiloj (la alvenintoj per fervojo oni invitos kunveturi) al la vilaĝeto Westerngrund (ĉ. 7 km). Post la vizito de la meza punkto – supozeble post la fotado - ni daŭrigos veturi al Gelnhausen kaj vizitos tie la imperiestran pa-latenon de Barbarossa. Poste estos certe an-koraŭ ebleco por kafumado en tiea kafejo.

Bonvolu sciigi s-ron Ullmann, 06031 4617 ĝis la 17a de aŭgusto, kiu volas partopreni, ĉar ni ja devas informi antaŭe la gastejon pri la ĉirkaŭa nombro de la partoprenontoj.

Atenton: ĉar Bavario – bonvolu kunporti la pasporton!

Walter Ullmann

## Piedpilko kaj matematiko

Hodiaŭ mi estis iomete laca kaj do mi decidis spekti la piedpilkludon kontraŭ Usono. Tamen, post la unua duono ankoraŭ ne okazis iu golo, kaj mi ĉagreniĝis, ĉar estis bona vetero ĉe ni (ne kiel en Brazilo, kie pluvis) kaj mi nur estis en mia ĉambro kaj spektis piedpilkludon de aliaj homoj.

Nu, post la unua duono de la ludo estis tre facila tasko kalkuli la finrezulton, kaj kompreneble la rezulto estos 0:0. Ĉar nun mi jam konis la rezulton, mi iris en la arbaron por kuradi. Mirinde estis, ke oni ne ĉesigis la ludon – la rezulto ja estis facile kalkuleba kaj do la dua duono de la ludo estos teda afero. Sed kredeble plej multe da spektantoj ne estas matematikistoj kaj ne povas kalkuli la finrezulton. Ili pagis multe por spekti la ludon kaj verŝajne pro tio oni ne povis ĉesigi la ludon.

Ĉu vi povas imagi kiom mi surpriziĝis reveninte hejmen kaj rimarkinte ke mia finrezulto ne estis la finrezulto de la ludo, kiu estis 1:0! Kial mi miskalkulis? Eble mi ne bone ekstrapolis. Do, mi aldonis pliajn punktojn kaj denove ekstrapolis uzante dividitajn diferencojn. Tamen, ankaŭ per tiu kalkulado mi ricevis ekzakte la saman rezulton kiel antaŭe: 0:0. Kiel ajn mi kalkulis, ĉiam mi ricevis la saman malĝustan rezulton!

Nun mi jam komencis pridubi la matematikon. Sed post plua rezonado, finfine mi vidis la belecon de la matematiko! La ekzakta rezulto de tiu ludo ja tute ne gravas, nur gravas kiu atingas kiun rangon en la grupo kaj kiu ludos kontraŭ kiu en la okonfinalo. Kaj ĝuste: kaj en kazo de mia rezulto kaj en kazo de la vera rezulto, estos la samaj ludoj en la okonfinalo. Kia triumfo de la matematiko!

d-ro Klaus Rŭmrich

## Kato kaj televido



Antaŭ la televido-aparato,
sur tabureto, sidis kato;
tre bonkondutis ĝi, silentis,
al mondnovaĵoj ĝi atentis
kun seriozo digna, deca.
Sekvis programo alispeca:
Ornitologo ekparolis;
Jes, birdoj sur l'ekrano rolis!
Nu, jen fringel', aŭ kanari', aŭ
Ĉu eble kanabeno….? MIAŬ!

Miaŭ! Salt'!
Ek! Kaj halt'!
Brulokula, sidis kato
Vibra sur la aparato,
klinis sin por kapti, vane,
belajn birdojn surekrane!

*El „Cent Ĝojkantoj“*
*de Marjorie Boulton*